



TEA-BULTENO

13^a JARO

MARTO - APRILO 2010

NUMEROJ 3-4

Vivu, kiel se vi mortus morgaŭ. Lernu, kiel se vi vivus eterne.
Mahatma Gandhi (1869-1948)

*Por tiuj, kiuj ne havis eblon ĉeesti la Jaran Asembleon, okazintan komence de pasinta februaro, jen la tekstoj de **prezidanta kaj sekretaria raportoj** pri agado dum 2009^a jaro.*

Estimataj Asocioj, karaj geamikoj,

alia jaro forpasis. Antaŭ ol preparoli la lastjaran agadon, ni adresu nian saluton kaj memoron al Devana Pizziga, tiu plenenergia, aktiva kaj disponebla membro de nia grupo kiu ne plu estas inter ni kaj kies manko sentebles konstante.

2009 estis jaro aparte laboriga: du gravajn eventojn ni sukcese organizis, pri kiuj ni plenrajte fieras. Temas pri la 61^a IFEF-Kongreso fine de majo kaj la ekspozicio kaj kunveno pri L.L. Zamenhof en novembro-decembro. Vi ja partoprenis ilin, kunlaboris en ties realigado, kaj sekve mi ne bezonas nun raportoj pri tio, ĉar vi bone konas la tuton.

Mi diris, ke plenrajte ni povas fieri kaj tion mi volas ankoraŭfoje akcenti. Per niaj modestaj fortoj, ni sukcesis en io, kio ofte ne sukcesas en pli nombraj kaj fortaj esperantistaj organizoj. Pri la kongreso ni ricevis multajn dankojn kaj laŭdojn de la partoprenintoj, eĉ kelkajn monatojn poste. Pri la ekspozicio la vizitintoj postlasis kuraĝigajn kaj subtenajn frazojn en la gastlibro. La tuto estis tre efike aranĝita kaj vekis interesigon kaj admiron la filozofio zamenhofa. La kunveno ĉe la Juda Muzeo estis same interesa, je bona kultura nivelo, kaj espereble signos komencon de bonaj interrilatoj kaj kunlaboro kun la juda triesta komunumo. En ĝia kadro ni ankaŭ prezentis la libron de Carlo Minnaja pri la verkoj de Zamenhof.

Ni tamen ne forgesu la publikan prezenton, ankaŭ sukcesan, de du gravaj libroj: tiu pri nia centjara historio, kaj tiu pri la itala traduko de «La strato Zamenhof». Ĉiuj tri libroj estas daŭre aĉeteblaj ĉe TEA: jen bela donaco al geamikoj en diversaj okazoj. Menciindas la kunlaboro kun pluraj aliaj kulturaj asocioj, kio klarigas al skeptikuloj, ke Esperanto estas lingvo perfekte funkcia kaj utiligebla en plej diversaj situacioj. Tiu ĉi estas kampo kultivebla zorgeme, ĉar povas doni bonajn fruktojn: tio ĉi bezonus multe pli da atento kaj efika laboro. La sekretaria raporto detale prezentos nian kompletan agadon: bonvolu aŭskulti ĝin atente kaj pensi pri via persona envolvigo en la diversaj punktoj. Demandu al vi mem «ĉu mi kunlaboris en tio?» «ĉu mi estus povinta fari ion pli?» «kion mi povos fari por pli efike helpi?». Vi ja scias ke ĉiam mankas laborforto, ke ni bezonus pli da personoj por instrui la lingvon, ke pri pluraj fakoj estus bele havi plenzor-

ganton. Kiel mi jam diris pasintjare, niaj vicoj re-duktiĝas pro diversaj kialoj: aĝo, sano, aliaj okupoj. Vizito de niaj kunvenoj fariĝis malpli kutima, favore eble al televidaj programoj. Tamen tiuj vizitoj estas ege utilaj por la asocia vivo, por flegi kontaktojn, por interŝanĝo de ideoj kaj preparo de projektoj, kaj absolute necesaj por lingva ekzercado.

En tiu ĉi 2010 jam pluraj projektoj puŝas nin al laborado: Semajno de internacia amikeco fine de februaro, Karstaj Tagoj fine de majo kaj, verŝajne, ankaŭ en oktobro, partopreno en diversaj kongresoj kaj aranĝoj, ĉiĉeronado en aŭgusto por partoprenontoj en la itala kongreso okazonta en *Lignano Sabbiadoro*, laŭeble kunveno de Alp-Adria Esperantistoj, kaj ... kaj certe io alia. Se vi povas, volas, deziras kunlabori, anoncu vin, partoprenu niajn semajnajn kunvenojn.

Hodiaŭ, laŭstatute, ni renovigos la asociajn gvidorganojn: bonvolu tuj pripensi tion. Delonge partoprenas la Estraron la samaj personoj, malfacilas anstataŭi la plej aĝajn. Se iu pretas transpreni taskon, anonciĝu sentime. Taŭga tasko troveblas.

Kaj por fini, kiel mi ofte, tro ofte, diris: TEA estas vi, helpu ĝin. Estu 2010 jaro de renovigo, de novaj elpaŝoj kaj sukcesoj. Ĝi alportu sanon kaj ĝojon, sed ankaŭ novajn membrojn al TEA por pli facila kaj glata disvolvigo de projektoj kaj atingo de la celoj. Vivu TEA kaj Esperanto!

Edvige Ackermann

Tre estimataj TEA-anoj!

2009^a jaro, jaro tre riĉa je gravaj diversspecaj manifestacioj, kiuj favoris la diskonigadon kaj de nia asocio kaj de esperanto tra la urbo. El la pluraj aranĝoj, elstaris unue la okazigo en Triesto de la

★ **61^a IFEF-Kongreso, ekde la 23^a ĝis la 29^a de majo**, plus 3-taga postkongreso. Partoprenis pli ol 200 personoj el 20 landoj, inter alie ankaŭ el Ĉinio. En 2009 la internacia fervojistaro celebris ankaŭ la centjariĝon de sia Federacio. Buntaj la teatraj prezentaĵoj, pro partopreno de la aktoroj Saša Pilipović kaj Giuliano Turone; pro klasikaj koncertoj: gitara de François Stride kaj akordeona de Margherita, violona de Egle Jarkova el Litovio kaj fortepiana de Sergio Escalera el Bolivio. Plie oni aŭskultis la Virinvoĉan koruson "I. GRBEC" de *Servola*/Triesto kaj la Tradici-kostuman Grupon *BISIACHI* de urbeto *Turriaco*: ambaŭ kantis ankaŭ en esperanto. Okaze de la kongreso estis eldonitaj du turismaj, esperantlingvaj, broŝuroj (LA KASTELO DE MIRAMARE kaj KVAR KASTELOJ) kaj aparte riĉa, kaj tre laŭdata, kongresa kajero 78-paĝa. La ekskurs

programo, dum- kaj post-kongresa, en Triesto, provinco kaj regiono, sukcese kontentigis la plejparton de la partoprenantaro. Aparte notinda la inaŭguro: ĉe la salon-enirejo la gastoj estis akceptitaj de virinoj en lokaj kaj aŭstra kostumoj disdonantaj artefaritan ornaman floron. La plurkoloraj ornamaĵoj estis faritaj de areto da TEA-volontulinoj sub atenta gvidado de Maria Grazia Sione: entute estis faritaj ĉirkaŭ 250 da. Dum la inaŭguro ĉeestis reprezentantoj de la Komunuma kaj Provinca Administracioj, de FISAIC kaj de lokaj fervojistaj organizaĵoj. Kronis la tuton la apero de la grupo "13 Triestaj Familioj" kiu, laŭtradicie, bonvenigis la gastojn per bunta, atento-kapta ceremonio. Por la kongreso estis eldonita filatela stampo per kiu estis aŭfrankitaj, nur dum la unua emisi-tago, pli ol mil speciale preparitaj kartoj kaj kovertoj. Entute oni povas aserti ke temis pri tre bone aranĝita kongreso, kaj se tiel estis, oni devas publike danki la tutan triestan esperantistaron kiu diversmaniere kontribuis por ties glata (preskaŭ!) disvolviĝo kaj fina sukceso.

Post mencio de la plej grava okazintaĵo en 2009^a jaro, nun ni kune rememoru, laŭ kronologia ordo, la aliajn aktivecojn:

★ **en januaro:** estis diskonigitaj la rezultoj de la Konkurso pri Kristnasko 2008, en kiu partoprenis 114 geknaboj, el 11 diversaj landoj. Ĉifoje la plej nombra grupo estis el Brazilo. Unuajn premiojn gajnis litovo, du brazilanoj, vjetnamo kaj la IKUE-grupo de Goma, el Konga Respubliko. Ĉiuj 114 knaboj ricevis buntan partoprendiplomon, kaj la gajnintoj koncernajn premiojn.

★ **22^a de marto:** organizita de la KulturAsocio *Friederich Schiller*, kunlabore kun TEA, okazis duhora fortepiana koncerto de Andrei Korobeinikov, en la Salono Beethoven. La eksterordinara virtuozezo de la rusa pianisto entuziasmigis la nombran aŭskultantaron kaj la junula ĉarmo fascinis la triestajn esperantistojn, dum la vespero kune pasigita.

★ **15^a de aprilo:** prezento, far prof-ino Gabriella Valera Gruber, de la libro "CENTO ANNI DI ESPERANTO A TRIESTE", ĉe Kafejo *San Marco*, ĉeeste de la eldonisto Aulo Chiesa. Post pli ol tri-jara preparado, fine, danke al konstanta penado kaj prizorgado de Giuseppe Valente kaj aliaj, tiu ĉi historia libro aperis.

★ **27^a de junio:** enkadre de "Somera Restadejoj 2009", nome internacia renkontiĝo pri poezio kaj verkada arto, organizita de neesperantista kultur-asocio kunlabore kun Kolegio de Unuigita Mondo de Adriatiko, en Duino, intervenis en publika Seminario, kun temo "La urboj en kiuj ni vivas", Edvige Ackermann kiu i.a. parolis pri esperanto.

★ **6-10 de majo:** en la Salono *degli Incanti* (eksa Centra Fiŝbazaro) okazis manifestacio kiu titolis "KUNE EN TRIESTO", nome Foiro de solidareco, organizita de la Asocio *Tutela Onlus*, kunlabore kun Komunumo de Triesto kaj ties sekcio "Grandaj Eventoj". Sin prezentis al publiko dum 5 tagoj, dudek kvin voluntulservaj asocioj, el kiuj ankaŭ TEA, kiuj per propagandiloj, kunvenoj, projekciado de dokumentfilmoj diskonigis sian agadon. Grandan volontulan kontribuon donadis triesta esperantistaro, alterne deĵoranta, ekde mateno ĝis vespero, ĉe tablo lokita en la Salono. Estis je dispoŝo miloj da propagandiloj (donacitaj de FEI), libroj, grama-

tikoj kaj kio ajn alia bezonata por taŭga reklamado. Okazis ankaŭ projekciado de bildoj pri esperanto kaj prezento de IFEF-Kongreso.

★ **7-11 de oktobro:** en stando disponigita de Asocio *Tutela Onlus*, kune kun aliaj asocioj, triesta esperantistaro havis eblon propagandi la internacian lingvon ankaŭ okaze de la regato "Barcolana".

★ **30^a de oktobro:** kiel Asocio laboranta ene de la LITERATURA HEJMO (*Casa della Letteratura*), TEA kontribuis al la programo de la kunveno, nomita "Hiperhavenoj, internaciaj literaturaj haltejoj". Tiun vendredon, unue ĉe la Supera Lernejo por interpretistoj kaj tradukistoj, Afrodita Cionchin, Esperanto-amikino, prezentis la problemojn pri tradukado de libroj de Claudio Magris, de la itala al la rumena lingvo, kaj due, ĉe la Antikva Kafejo *San Marco*, okazis premiera prezento de la libro de Roman Dobrzyński "Strato Zamenhof", en la itala traduko (*Via Zamenhof*) de Michela Lipari kaj Filippo Franceschi. La publiko, nombra kaj scivolema, havis la eblon alparoli kaj la polan aŭtoron kaj la italan tradukintinon.

★ **21^a de novembro - 8^a de decembro:** kun subteno kaj patroneco de Triesta Komunumo—Sekcio Kulturo, estis aranĝita ekspozicio pri la vivo kaj pensoj de LLZ, kun titolo: "ANTAŬ 150 JAROJ NASKIĜIS LAZARO LUDOVICO ZAMENHOF", en Salono FITTKE, la ekspoziciejo malantaŭ la Urbodomo. La 20^{an} de novembro okazis la inaŭguro, kiun ĉeestis la kultur-skabeno Massimo Greco kaj ĉirkaŭ kvindeko da triestanoj. La ekspozicio estis vizitebla ĉiutage, inkluzive de festotagoj, matene kaj posttagmeze. Ankaŭ ĉikaze dankindas la nombraj TEA-anoj kiuj alterne tie deĵoris. La ekspozicio ampleksis 21 panelojn, sur kiuj estis priskribitaj kaj la vivo kaj la ideoj de nia Majstro. Admiris ĝin ĉirkaŭ 600 personoj. Oni ricevis multe da komplimentoj, fare de vizitintoj, pro la atentokapta kaj konciza prezentado, kaj pluraj eldiris sian dankon pro la ŝanco konatiĝi kun tiel grava personeco, pri kiu malmulte, ĝenerale, oni scias. Ampleksa estis ankaŭ la diskonigado fare de ĵurnaloj, radio kaj retĵurnaloj.

★ **10^a de decembro:** posttagmeze, ĉe la Muzeo de Hebrea Komunumo "Carlo e Vera Wagner" prelegis pri la temo: LAZZARO LUDOVICO ZAMENHOF - EBREO E CITTADINO DEL MONDO, INTERPRETE DELL'EMANCIPAZIONE EBRAICA E DELLA LIBERAZIONE DEI POPOLI, d-ino Tullia Catalan, universitato de Trieste; d-ro Federico Gobbo, universitato de Insubria, Varese, kaj Prof. Carlo Minnaja, universitato de Padova. Michela Lipari, Roma, parolis pri la figuro de Klara Silbernik-Zamenhof. Ĉeestis ĉirkaŭ 50 personoj.

Kaj nun pri:

Esperantistaj gastoj en Triesto: dum la jaro vizitis nin Elda kaj Alessandro Corrado el Brescia; Folkmar Keller el Vieno, Aŭstrio, kiu, en septembro, restadis niaurbe 4 tagojn; Boris di Costanzo, Vjekoslav Morankić kaj aliaj geamikoj el Rijeka.

Tradiciaj festoj: Ni daŭrigas la kutimon kunveni festi Kristnaskon kaj Jarfinon. Kaj tiel estis ankaŭ en 2009: estis bona okazo, por kune tosti, amuziĝi, interbabiladi malstreĉetose kaj eĉ tombolludi. Ankaŭ ĉijare TEA trovis, inter la branĉoj de la kristnaska asocia arbo, plurajn kovertojn enhavantajn mondonacojn! Dankon al malavaruloj!

▲ **Pri kongresoj/konferencoj.** Kelkaj TEA-anoj ĉeestis UK-on en Bjalistoko, Italan Kongreson en Cassino kaj „Feston de Amikeco“ ĉe Arnoldstein.

Pri ekstera informado

★ la 22^{an} de decembro, **Tele 4** invitis Edvige Ackermann ĉeesti la programon: “Il Baule del tempo” (*El la kofro de l' tempo*), por paroli pri “Kristnasko tra la mondo”.

★ la 24^{an} de decembro, ĉe **Radio Capodistria**, Michela Lipari kaj Edvige estis intervjuitaj de la ĵurnalisto Ornella Rossetto pri la traduko, itallingven, de la libro “Via Zamenhof” kaj pri esperanto ĝenerale.

Krome, okaze de la diversaj, antaŭmenciitaj, eventoj, Edvige Ackermann parolis ĉe *Radio Attività*, *Radio Fragola*, *Radio Fantasy*, *Radio Capodistria* kaj RAI – radio-ĵurnalo de Friulo Julivenetio.

Anoncojn/informojn pri esperantaj okazaĵoj oni sendis al radioj kaj lokaj ĵurnaloj dum la tuta jaro.

Pri alirprogramoj de RADIO UNO: daŭrigas la partopreno de TEA en la aliprogramoj de RAI. Dum

la jaro okazis entute 8 elsendoj, pri esperanto ĝenerale kaj TEA specife.

Pri asociaj informoj:

La informilo TEA-BULTENO daŭre aperas, pli-malpli regule ĉiun duan monaton, en siaj paper- kaj ret-versioj. Dankon, se vi legas ĝin!

Korespondado: en papera versio estis ricevataj 36 kaj senditaj 35 leteroj, kiuj troviĝas en siaj apartaj ujoj pri “Korespondado 2009”. Tio ĉi rilatas la ordinaran korespondadon asocian. Ne estas enkalkulitaj la leteroj/mesaĝoj rilate al IFEF-Kongreso, kiuj preskaŭ nenombrebilas. Ĉio pri tiu kunveno kuŝas en arkivo paper-formate kaj troviĝas ankaŭ en kompaktaĵoj. Ankaŭ ĉio koncernanta la ekspozicion pri Zamenhof, konsultendas en aparta ujo, kaj paperversio kaj diskete. Oni devas alkalkuli la 144 leterojn kaj diplomojn, kolore printitajn kaj senditajn al partoprenintoj en la konkurso pri Kristnasko, plus 5 apartaj pakaĵoj kun la premioj.

Kaj per tiu ĉi informo mi finas la raporton, dankante vin pro la pacienca aŭskultado.

Elda Doerfler

nǔ shū “*Pli bone posedi hundon, ol havi filinon*” (ĉina proverbo)



En malproksima epoko, in-subpremema, la virinoj vivis en socio en kiu la viro havis ĉian povon, ĉu en labora, ĉu en familia, ĉu en administracia, ĉu en politika kampoj. Mankaj je iu ajn rajto, submetitaj al voloj kaj deziroj de patroj kaj edzoj. En tia etoso do naskiĝis kaj evoluis sekreta lingvaĵo, ina lingvaĵo, strikte rezervata al virinoj, tradicie transdonata de patrino al filino, ĵaluze gardata en fermita, nur ina, mondo. Tute malatentata kaj ignorata de tiu maskla. *Nu Shu*, ĝia nomo.

En la antikva *Hunan*, studado de “*Nan Shu*”, nome “vira skribo”, estis malpermesata al la virinoj kaj ĝuste en tiu provinco de la suda parto de Ĉinio, estis inventita tiu lingvaĵo, tre intime ligita al unikeco de lokaj moroj kaj kutimoj. Ĝin aparte influis la propraj karakteroj de la ĉina Hanplimulto miksitaj kun la etna grupo *Yao*, ĉi lasta karakterizita de fortaj matriarkaj ecoj.

Kiuj elpensis *Nu Shu*, tiun ĉi tre originalan skrib- kaj parol-sistemon? Virinoj analfabetaj, sen ia formo de edukado, kiuj eksentis la bezonon iel defendi sin de la vira perfortemo kaj samtempe havigi al si mem ian vivokialan spacon. La ĉiutaga sento pri daŭra diskriminacio, esti nura objekto uzenda kaj uzinda por naski kaj kontentigi la virajn dezirojn, esti konsiderataj malsuperaj aĵoj kies vivo valoras neniom kaj kies vivkvalito interesas neniun: ĉio ĉi kaŝiĝas sub la deziro doni voĉon al sia memo. Iel oponi, kontraŭstari tiun perforton, moralan kaj fizikan, sen tamena risko provoki la venĝemon viran.

Tiu sekreta lingvo estis la konkreta esprimo de la ina ĉiutagaĵo, ĝin oni legis aŭ elmodulis kvazaŭ kante, dum virinaj kunvenoj kudrad- aŭ brodad-celaj. Sed ĝi ne estis nura lingvo: ĝi estis kunligilo inter virinoj, kies destino tutsimilis, ĝi igis ilin fratinoj, transformis ilian malhelan, grizan, malbonodoran, tristan vivon, plej ofte preskaŭ neelteneblan, al ia speco de momenta forflugo al alia mondo, parfumita kaj kolorbrila. Sekretaj vortoj malkatenigis profundajn emociojn, malkaŝis la rankorojn al la vira superregado, eligis melan-koliojn, kio iel malplipezigis ilian devige submetiĝan sorton.

Dum jarcentoj tiu *Nu Shu* estis ignorata kaj nur duone de la pasinta oni, abrupte, priatentis ĝin: kial? Ne certe pro subita ekinteresiĝo pri virinaj aferoj! Ĝi vekis la scivolemon de la sekretserva polico pro timo, ke ĝi estu ia sekreta kodo uzata por internacia spionado. Okupiĝis pri ties interpreto/traduko la plej superaj akademioj de la lando. La plej elstarajn lingvistojn oni konsultis, sed neniu el tiuj fakuloj sukcesis deĉifri tiun “kodon”. Nur en 1980-aj jaroj tiu skribsistemo estis rekonita kiel *Nu Shu*, kiu fakte signifas “virina skribo”-n! Konsistanta el 7 mil karakteroj, ĝi diferencigis al la ĉina skribo, karakterizita de kvadrataj kaj rektliniaj signoj, pro karakteroj kurbaj, kiujn ofte la virinoj brodis sur siaj vestoj kvazaŭ kiel desegnaĵoj.

“Antaŭ puto ne eblas morti pro soifo. Kiam ni kunestas kun niaj fratinoj, ne povas ekzisti malespero”. Tio legeblas en la *Nun-Shu*-lingvo: kaj tio helpis tiujn virinojn elteni siajn suferojn kaŭzitaĵojn nur de ilia ... ineco. Kantoj, poeziaĵoj, animelverŝaĵoj akompanis la virinojn dum jarcentoj, tiuj reprezentis ilian liberan mondon, kie rifuĝi sin por protesti kontraŭ tiun silentan mondon, en kiun la viro volis ilin enprizonigi. Leteroj plenaj je emociaj sentoj, kantoj esprimantaj la deziron forfuĝi el tiu kruela realaĵo, eĉ taglibroj kaŝitaj subtere aŭ entombigitaj kun la aŭtorinoj mem... : jen la krudaj atestoj de malaperinta vivrealo. Tiuj nun senvualiĝas, en ĉi moderna epoko, por pluvivigi lingvon per kiu miloj kaj miloj da virinoj komunikis inter si, helpis unu la alian superi la spiritan neniigadon, kaj, danke al kiu, ili povis senti sin liberaj.

Post ekscioj pri lingvoj kiuj daŭre, preskaŭ ĉiutage, estingiĝas, jen bona novaĵo pri lingvo, kies historia kaj kultura fono brakumas jarcentojn kaj jarcentojn da virinaj suferoj, kaj kiun la deziro retrovi proprajn originojn, detruitajn de vandalaj politikoj, kiel ajn ties formo, nerezisteble ree enigis, plenrajte, en la liston de la ankoraŭ ekzistantaj homaj lingvaĵoj.

Elda

Trafoliumante libron de historiaj rememoroj **Triesto kaŝita**

Templanoj en Triesto

La kruco de la Templaj Kavaliroj, la misteraj kaj legendaj mezepokaj kavaliroj, elstaras sur la maldekstra, enirpordega, fosto de Katedralo Sankta Justo.

La kavaliroj, kun sekulara kaj religia povoj, havis multajn posedaĵojn ankaŭ sur nia teritorio. Konata kaj dokumentita estas la ekzisto, piede de la monto *Neviso*, de granda domo, propraĵo de Templanoj (je 30 km for de Triesto, nun en Slovenio). Krome ankaŭ en la teritorio de *Muggia* ili havis kaj kastelojn kaj terenojn.

Historio rakontas, ke la kastelo en *Monrupino* apartenis al la Kavalira Ordeno: baze de la nuntempa preĝejo ankoraŭ nun videblas ilia simbolo, la "taŭa" kruco. Bedaŭrinde nenion certan oni scias pri iu ilia templo en la urbo mem. Kelkaj dokumentoj supozigas, ke ĝi troviĝis en la nuntempa placo *Cavana* kaj ke estis detruita en 1313.

El tiu fora mondo, ankoraŭ nun misteroplena, restas nur kelkaj, unuopaj signoj, ĉizitaj sur ŝtonoj.

La "analfabeta" Leono

Sur la fasado de la urbodomo en *Muggia* [elp. Muĝa] staras altreliefa, blankŝtona Leono. Kiel certe oni ja scias, la flugilhava leono simbole prezentas evangeliiston Marko, la sanktan protektanton de Venecio. Sur la libro, kiun la besto firme tenas per sia antaŭa, dekstra piedo, legeblas la vortoj de Kristo, aldiritaj al Marko: "*Pax tibi, Marce, Evangelista meus*" (Paco al vi, Marko, mia evangeliisto).



La leono mem simbolas la parolan fortecon de la evangeliisto kaj la flugiloj la spiritan leviĝon. Iĝinta simbolo de la urbo Venecio, ĝi videblas en plej diversaj pozoj kaj aspektoj, el kiuj ĉiu havas sian apartan signifon. Ekzemple, en paca tempo, ĝi tenas malfermitan libron, dum en milita superfermita libro staris glavo. Ĝenerale la leono simbolas majeston kaj grandpovon, precipe se ĝia vosto estas levita alten, dum per la libro oni aludas konceptojn pri scio kaj paco. La glavo, krom forto, sugestas ankaŭ justecon.

La Sanktmarkaj Leonoj, el ŝtono, ligno aŭ fero, estis uzitaj ankaŭ ornamcele, kaj ĝia ĉesto sur konstruaĵo, ĉefe se milita, donis al tiu eĉ pli da graveco.

La leono en *Muggia*, eĉ se havanta fermitan libron, tamen senas je la glavo. Oni supozas, ke origine ĝi estis tie, probable forĝita el fero kaj surmetita sur la ŝtona altreliefo, sed – oni ne scias kiam kaj kial – pli poste aŭ oni ŝtelis aŭ detruis ĝin.

Kiel ajn, triestanoj sprite mokis *Muggia*-civitanojn, asertante, ke la leono havas fermitan libron ĉar ne valoris ion surskribi, pro la fakto ke ili ne scipovas ... legi. Tial la leono estis nomita "analfabeta"!

DAŬRA ILUZIO

Daŭre trompadas la eldonistoj, iluziante la homaron, ke eblas interkomuniki per tute nova generacio de elektronikiloj.

Nun "*Nuovi Frasari Garzanti Linguistica*" [Novaj frazkolektoj G. (pri) lingvistiko] aperis ĉe *Garzanti*, kiuj per mirakla *TOUCH*, tuŝo de magia bastoneto – via montrofingro – permesos al vi "*capire e farsi capire*" [kompreni kaj kompreniĝi] dum viaj vojaĝoj tra angla– kaj franca–lingvaj landoj.

Bonŝance, lasta honesteca fajrero deklaras al la eldonisto: "en tipaj vojaĝo-situacioj"!

Sed, dum vojaĝo en fremdaj landoj, ĉu sufiĉas al vi kapablighi demandi nur informojn pri strato, hotelo, poŝtoŝtanco? Aŭ ĉu, almenaŭ iomete, vi ŝatus kompreni la pensmanieron de la loĝantoj? Vojaĝi por nur kolekti memoraĵojn, aŭ akiri rajton diri: 'mi vojaĝis ĝis ...', havas nenian signifon. Vojaĝi laŭ centoj da kilometroj sen kunporti hejmen eĉ guteton de la loka spirito, estas senutila peno.

Neniu rapida lingvo-kurso, konversacia manlibro, vojaĝo-gvidilo povos kontaktigi vin kun lokaj homoj per konversacio, per interŝanĝo de impresoj. Neniu magia elektronika skatolo, eĉ se per oferto je vere modera prezo de € 4,99, akirigos al vi ĝisfundan riĉiĝon de via spirito.

Tion celas Esperanto, kaj nia devo estas kiel plej eble disvastigi tutmonde lernadon de la internacia lingvo kaj ne luliĝi en daŭraj iluzioj.

Tion memorigu. Ĉiam.

Viglo

Karstaj Tagoj
2010

Triesto atendas vin, deziranta prezenti sian unikan teritorion. En ĉi sezona momento la plej nuancitaj koloroj flaŭraj akordiĝas perfekte kun la kruteco kaj forto de l' blanka ŝtonaro, kiun per fajne delikataj movoj Naturo modlis mirige.

Ĉu vi ne estas scivolemaj malkovri ĉi belaĵojn? Se jes, ni varme invitas vin veni, por kune pasigi kelkajn tagojn:

de la 29^a de majo ĝis la 2^a de junio

Provizora programo antaŭvidas vizitojn de Kastelo en Duino kaj promenado laŭ pado Rilke; tuttaga ekskurso al Valo Rozandra; ekskurso al *Muggia*, laŭ karsta itinero; k.a.

Bonvenon en Triesto! Petu pliajn informojn skribante al Triesta Esperanto-Asocio (vidu pĝ. 5^a) aŭ, rete, al jenaj adresoj:

nored@tiscali.it; testudo.ts@gmail.com



Artiŝokoj

plenigitaj per avenflokoj

Per tiu ĉi legomo, kultivita en kampoj precipe laŭlonge de mediteraneaj

marbordoj kaj aperanta en bazaroj komence de aŭtuno, gekuiristoj povas pretigi bongustegajn pladojn. Ĝi havas ecojn digestigajn (fakte ĝi entenas ian amaran elementon, uzatan ankaŭ por digestiglikvoroj) kaj kuracajn, precipe kaze de iuj hepataj malsanoj. Jen unu el la multaj kuirebloj de tiu ĉi tre saniga legomo:

8 artiŝokoj
100 g da avenflokoj

2 ajleroj

1 citrono

pinĉeto da majorano

oleo (k.b.)

salo (k.b.)



Fortranĉu la surpintajn pikilojn kaj deprenu la plej eksterajn foliojn. Post lavado, ilin boletu en iom sala akvo, en kiun vi metis ankaŭ la citronan sukron, ĝis nekompleta kuiriĝo. Tiam ilin senakvigu kaj atendu ties malvarmetiĝon. Dume kovru per iom da akvo, en kiu kuiriĝis la legomoj, la avenflokojn, lasante ilin trempi ĉ. kvaronhoron. Malplenigu la internan parton de la artiŝokoj, ĝin haketu, aldonu la du dispecigitajn ajlerojn, pinĉon da majorano kaj la trempitajn avenflokojn, kaj salu kiom bezonate. Per ĉio ĉi farĉu la artiŝokojn, ilin metu en oleumitan rostplatton kaj fine kuiru en forno (ĉ. 180° da temperaturo) dum 20 minutoj.

Laŭplaĉe, oni povas aldoni, al la farĉo, fromaĝon, kaporojn, ŝinkon... Bonan apetiton!

Por pli bone koni Trieston kaj ties ĉirkaŭaĵon

Karaj TEA-anoj! Unufoje monate, Rosanna (tel. n-roj 040 43864; 340 3603291) invitas vin al vizito de muzeo aŭ ekspozicio en Triesto kaj ekskurso-promenado duontaga, en Karsta teritorio.

La vizito de muzeo/ekspozicio okazos ankaŭ kaze de pluva vetero, dum la ekskurso ne. Estas intenco ankaŭ organizi komunan tagmanĝon en iu karsta restoracio post la promenado, sed pri tio vi mem decidis, kiam vi konfirmos vian partoprenon al la prizorgantino Rosanna.

En la monataj programoj vi trovos indikitaj, kiam kaj kiel disvolviĝos la aranĝoj: se vi intencas partopreni en unu aŭ ĉiuj programeroj, **NEPRE** anoncu vin al ROSANNA. **ATENTIGO**: pro la malvasteco de la Apoteka Muzeo *Picciola*, nur **10 personoj** povas samtempe ĝin vidi - tial senprokraste telefonu al Rosanna por mendi la viziton! Enprograme dua vizito, interkonsentota kun la muzeo-posedanto, en alia tago, kaze de pluraj interesigaĵoj.

Kompreneble oni varme invitas ĉiun el vi kontribui al ĉi projekto pasigi kune kelkajn horojn, en malstreĉa etoso, kun nura celo ĝui amikan kunestadon. Bonvenas viaj amikoj, amikoj de l'amikoj ... ktp!!!

Atentigo: NE PLU VALIDAS LA POŝTA ADRESO de TEA: C.P. 601 - 34132 Trieste

Ekde nun ĉiuj korespondaĵoj, revuoj k.a. devas esti senditaj al la jena adreso:

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Via del Coroneo 15 IT-34133 TRIESTE TS - ITALIO

Marta Programo

2 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
4 ĵaŭdo	17h30 - Kunveno pri F. Schiller (2 ^a etaĝo)
5 vendredo	20h00 - UEA VIVA kaj TV Bjalistoko
9 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
12 vendredo	20h00 - Venontaj kongresoj: Kubo kaj <i>Lignano Sabbiadoro</i>
13 sabato	Vizito de Apoteka Muzeo PICCIOLA - rendezuo akurate je la 10^a horo - Via A. Caccia 3 - flanke de UPIM
16 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
19 vendredo	20h00 - Poeziaĵoj de italaj poetoj en esperanto
20 sabato	17h30 - Koncerto pri popolmuziko el Karintio - <i>Salono Beethoven</i>
23 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
26 vendredo	20h00 - Krucvortumado
27 sabato	Promenado en la arbaro Tommasini - renkontiĝo je la 9h20 ĉe haltejo Tramo de <i>Opicina</i> (piazza Oberdan) - ĝi ekiros akurate je la 9h31 - eblos kune tagmanĝi ĉe la restoracio de Kampadejo <i>Obelisco</i>
30 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo

Aprila Programo

2 vendredo	20h00 - Aprilaj fiŝoj!
5 lundo	Bonan Paskon!
6 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
9 vendredo	20h00 - UEA VIVA kaj TV Bjalistoko
10 sabato	Vizito de Fervoja Muzeo kaj ekspozicio pri triestaj tramoj - renkontiĝo je la 10^a horo antaŭ la muzeo
13 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
16 vendredo	20h00 - Ni traduku kune...
19 lundo (2 ^a etaĝo)	18h00 - Itallingva prelego pri: "L'età dell'oro del boccale: dalle origini al suo massimo splendore"
20 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
23 vendredo	20h00 - El Esperantaj ĵurnaloj
24 sabato	Promenado de <i>Prosecco</i> al <i>Miramar</i> : renkontiĝo en Piazza Oberdan, je la 9^a horo - ekiro per aŭtobuso 42 je la 9h05 - reveno per aŭtobuso 36
27 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
30 vendredo	20h00 - Niaj ttt-paĝoj, finfine!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - mardo 17-19; vendrede 19-21

Tel: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Grupa ttt-ejo: //it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina

Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349

Uno per tutti ... cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

*Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina
senza costi per voi!*

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

**La nostra Associazione è fra gli enti che
possono ricevere questo contributo.**

Come fare ?

È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2009 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

**numero di codice fiscale
dell'Associazione Esperantista Triestina**

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA
Il Presidente
(*Edvige Ackermann*)

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
C.F. 90012340320